

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1074 (44/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Ek al nova jaro!	2
- Nova estraro de IEJ.....	2
- Ĝingl bellz, ĝingl bellz... ..	2
- Si comincia a parlare dell'UK di Torino	3
- E cominciamo a parlarne anche noi	3
- Interkultura Novelo-Konkurso	3
- "La lingua neutrale" di Camilla Peruch	4
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton.....	5
- Pillole di Salvezza 1074: Biagio Marin	5



EK AL NOVA JARO! BONDEZIROJN EL LA REDAKTEJO DE NSiR

NOVA ESTRARO DE IEJ



La 23an de decembro, okaze de sia Jarasembleo, *Itala Esperantista Junularo* elektis sian novan estraron, kiu konsistas el:

- Pierre CALIARI – Prezidanto
- Emanuele REGANO – Vicprezidanto
- Francesco FAGNANI – Ĝenerala Sekretario
- Giorgio PERNA – Kasisto.

Al ili, kaj al la asocio kiun ili gvidos, bonan laboron!

ĜINGL' BELLZ, ĜINGL' BELLZ...

Kaj por via aŭskult- kaj rigardplezuro, jen ligilo al 'Tintilo' (la Esperanta versio de Jingle Bells) kreita kaj iniciatita de Zdravka Boytcheva kaj la Internacia Esperanto-ĥoro + gastoj.

<https://youtu.be/aAuqoCcFHCw>

SI COMINCIA A PARLARE DELL'UK DI TORINO



Corriere della Sera, 30 dicembre 2020

E COMINCIAMO A PARLARNE ANCHE NOI

Tra due anni ci troveremo a vivere una meravigliosa ed impegnativa esperienza: il 108° congresso mondiale di esperanto in Italia, a Torino. Ma perché questo evento sia organizzato al meglio occorre iniziare a costruirlo tutti insieme. Il primo appuntamento sarà a fine luglio 2021 al congresso di Belfast, dove lo presenteremo ufficialmente. Quindi venite, iscrivetevi, partecipate. Non lasciatevi frenare dal timore di un'eventuale lontana possibilità di annullamento del congresso. In questo remoto caso non perderete la quota di iscrizione ma potrete utilizzarla per un successivo congresso (chi si fosse iscritto al Kongreso di Montreal 2020 può utilizzare tale quota). Quindi... aderiamo. Iscriviamoci e troviamoci a Belfast

Michela Lipari (IEF Estrarano pri Organizado de la Torina UK)

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO (INK) HAVAS F. LORRAIN KIEL PREZIDANTON KAJ N. RUGGIERO KIEL SEKRETARION

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) estis lanĉita de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) la 20-an de septembro 2020 dum la Printempa Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020), sub la aŭspicio de UEA: uea.org/gk/909a1. La lanĉo de la konkurso spekteblas ĉe la jutubkanalo UEA viva: youtu.be/8g1w_xEdZVU?t=6661.

Nun ALE kaj UEA anoncas la nomumojn de François (Francisko) Lorrain, el Kebekio, kiel prezidanto de la konkurso kaj de Nicola Ruggiero, el Italio, kiel sekretario. "Ni tre antaŭĝojas pri la alvenontaj kontribuajoj. Certe tiu ĉi konkurso

helpos plu kulturi nian literaturon kaj nian homaranismon en tiu ĉi epoko”, deklaras ili.

François Lorrain estas delonge Esperanto-tradukisto kaj redaktanto. Interalie li tradukis “[Kristnaskaj Rakontoj el Franca Kanado](#)” kaj reviziis la [tradukon de “La Eta Princo”](#). Dum multaj jaroj li reviziis la kebekian revuon La Riverego kaj la internacian revuon La Gazeto. Nuntempe emerita, li bakalaŭriĝis pri matematiko kaj fiziko en la Universitato de Montrealo (1967) kaj doktoriĝis pri sociologio en la Universitato Harvard (1972). Li instruis sociologion en la Universitato de Kebekio en Montrealo (UQAM) kaj karieris ĉefe pri instruado de matematiko ĉe mezlernejoj. Li ankaŭ laboris pri fiziko, precipe partoprenante kun sia patro Paul Lorrain, prof esoro en la fizika fakto de la Universitato de Montrealo, en la verkado de lernolibroj pri elektromagnetismo.

[Nicola Ruggiero](#) estas Esperanto-verkisto, poeto, membro kaj estrarano de Akademio Literatura de Esperanto kaj redakciano de “Beletra Almanako”. Li publikigis en Esperanto du poemarojn kaj verkis eseojn kaj recenzojn. Li loĝis en Islando kaj en la Universitato de Islando bakalaŭriĝis pri la islanda kaj angla lingvoj (2015) per islandlingva disertaĵo pri la memtradukoj de Baldur Ragnarsson. Nuntempe li loĝas en Italio kaj magistriĝas pri lingvistiko en la Universitato de Torino.

INK okazas ĉirkaŭ la temo “KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin” kaj jam ricevis novelojn el Eŭropo kaj Ameriko. Verkemuloj el la tuta mondo bonvenas sendi siajn tekstojn **ĝis la 20-a de junio 2021**. Interkultura ĵurio elektos la gajnintajn novelojn, kiuj ricevos premiojn de 500, 300 kaj 200 eŭroj laŭ la 1-a, 2-a kaj 3-a loko, respektive. Kompletan regularon eblas legi ĉe akademio-literatura.org/ink/regularo. La konkurso-rikolto estos publikigita kiel elektronika libro.

“LA LINGUA NEUTRALE” DI CAMILLA PERUCH

Martedì 12 gennaio ore 18.00 sulla piattaforma Zoom ci sarà una conferenza in forma di dialogo: “La lingua neutrale di Camilla Peruch”.

Paolo Rottin (Gruppo Esperantista "Sile" di Treviso) dialoga con Camilla Peruch, autrice del libro “La lingua neutrale” edito da Kellermann. Introduce Luigi Fraccaroli (presidente FEI). Presentazione e moderatore: Laura Brazzabeni (vicepresidente FEI).

Il link per la connessione è il seguente:

<https://us02web.zoom.us/j/82052483743>

ID riunione: 820 5248 3743

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON



PILLOLE DI SALVEZZA 1074: BIAGIO MARIN

Il 24 dicembre è l'anniversario della morte (nel 1985) del poeta e scrittore italiano Biagio Marin (1891-1985),

it.wikipedia.org/wiki/Biagio_Marin, nato e morto a Grado (una piccola cittadina marinara nella provincia friulana di Gorizia, a mezza strada tra Venezia e Trieste), ma vissuto lungamente altrove (Gorizia, Pisino d'Istria, Firenze, Vienna, Svizzera, Roma, Trieste).

www.bitoteko.it/esperanto-vivo/2017/12/24/biagio-marin/

Trascriviamo la traduzione in Esperanto della sua poesia "Capodistria" (Capodistria è il nome italiano della città ora slovena di Koper). Purtroppo, non siamo riusciti a trovare l'originale in gradese; traduciamo alla lettera in italiano, sulla base della versione in Esperanto. Alleghiamo un francobollo sloveno del 2018, con i principali monumenti di Koper-Capodistria, in stile veneziano.

CAPODISTRIA	CAPODISTRIA
Dum mil jaroj flor' de belulino en la valego norden rigardinta,	Per mille anni fiore di bellezza, nel vallone volto a nord,

<p>en ĉiu ŝtono venecianiĝinta, en kor' la flamo de la Doĝedzino. Placoj kaj stratoj en plena babilado milda kaj dolĉa kiel tiu Rialta; en la palacoj, en humil' servado ĉiam sintenado alta. Tiomaj cent jaroj ĉiam al tiu celo tiomaj cent jaroj ĉiam kun tiu rolo, kaj ĉiun koron markis tiu sigelo. Pliposte venis horo de l' martiro kaj la ŝtormo disrompis ĉiun velŝkoton kaj la mil jarojn trafis la subiro.</p> <p><i>Biagio Marin (el "Istriaj elegioj", 1963), trad. Luigi Tadolini</i></p> <p><i>"L'Esperanto" 1988-3,4</i></p>	<p>veneziana in ogni pietra, nel cuore la fiamma della Dogaressa. Piazze e strade in pieno chiacchierio mite e dolce come quello di Rialto; nei palazzi, nell'umiliazione, nella servitù sempre un alto portamento. Tanti cento anni sempre a quella meta tanti cento anni sempre con quel ruolo, e ogni cuore ha segnato quel sigillo. Poi venne l'ora del martirio e l'uragano sconquassò ogni scotta e il tramonto colpì mille anni.</p> <p><i>Biagio Marin (da "Elegie istriane")</i></p> <p><i>Retroversione letterale dalla traduzione in Esperanto</i></p>
--	---



